


ESPERANTO JUNAS EN FRANCIO



# Jeun Espéranto

*infa*



Magazine de l'association JEFO

JEFO informas • Bimestriel • Mars - Avril 1997 • n° 97/2 • 25 FRF




## CHEESE!!!

[www.worldnet.fr/~mjb/jefo](http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo)

Tout  
savoir  
sur J@fo

# espéranto

Le saviez-vous



**Il existe une langue connue par des millions de personnes, parlée sur les cinq continents et accessible à tous**

## Une langue pour partir au bout du monde...

**L**angue neutre, elle n'appartient à aucune nation mais à tous les peuples. Celui qui la parle peut rencontrer beaucoup de monde en voyageant, lors de festivals, de rencontres ou même par correspondance...

### L'espéranto, tout le monde peut l'apprendre

- des règles de grammaire sans exception,
  - aucun verbe irrégulier,
  - des racines que l'on retrouve dans de nombreuses langues,
  - des familles de mots faciles à construire et à retenir
  - un vocabulaire riche, précis et nuancé,
  - des règles de prononciation très simples,
  - donc une langue beaucoup plus rapide à apprendre que toutes les autres !
- Et si vous voulez apprendre d'autres langues, l'espéranto vous y aidera...

### Une association de jeunes pour l'espéranto

**E**spéranto-Jeunes (JEFO) réunit des espérantophones de toute la France pour faire connaître l'espéranto, en particulier auprès des jeunes, informer sur la culture espérantophone (livres, musique, spectacles...), les moyens d'apprendre la langue et les prochains événements en France et dans le monde.

L'association organise aussi des rencontres, festivals et week-ends gastronomiques tout au long de l'année. Profitez-en pour découvrir la langue internationale espéranto et prendre un bain linguistique !

### L'espéranto, une vraie culture vivante

**L'**espéranto vit pleinement pendant les festivals, rencontres et congrès organisés tout au long de l'année dans de nombreux pays. Des troupes de théâtre, des chanteurs, des groupes de musique s'y produisent. C'est aussi l'occasion de découvrir les derniers livres, revues et disques compacts en espéranto. Se réunir, danser, discuter, rire, échanger des idées... dans une ambiance vraiment internationale.



### PASPORTA SERVO

#### Un autre tourisme : direct et convivial

Le réseau d'hébergement gratuit «Pasporta Servo» permet, pendant les voyages, de connaître le pays visité et ses habitants.

En effet, plus de 1500 espérantophones de 70 pays sont volontaires pour accueillir des jeunes du monde entier.

Vous pouvez ainsi passer la nuit dans une famille et découvrir ce qui aura échappé aux autres touristes, tout simplement en parlant en espéranto avec vos hôtes.

**Espéranto-Jeunes - 4 bis, rue de la Cerisaie - 75004 PARIS**

Internet : <http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo> ou chercher "jefo"

## > Enhavo (Sommaire)

**JEFO freŝe**  
lastaj novaĵoj pri via  
preferata asocio  
P. 4

**Malesperantio**  
ili pri ni  
P. 6

**Expolangues '97**  
ni havis budon tie!  
P. 9

**La Mamma**  
traduko de tiu fama  
kanto  
P. 10

**Kurso**  
jen la dua leciono  
P. 11



**Ĝenerala  
Asembleo**  
protokolo de nia  
lasta Ĝ.A.  
P. 15

**La nova estraro**  
malkovru la vizaĝojn  
de la novaj  
estraranoj  
P. 19

**Fromaĝa  
Semajnfino**  
por la frandemuloj  
P. 20

**Ralio**  
propono por la  
venonta ago-tago  
P. 21

**Kiel ĉarmi viron?**  
sen komentoj!  
P. 22



## > Enkonduko..... (Éditorial)

*Tiu numero estas normale por marto/aprilo, sed ni jam estas en majo. Do kvankam ni promesis esti akurataj komence de tiu ĉi jaro (ah, tiuj stultaj decidoj dum la novjaro!), ni fakte ĝis nun ne sukcesis atingi normalan aperritmon. Sed, tamen kompare al la pasinta jaro ni pli fruas (aŭ fakte malpli malfruas) de kelkaj tagoj por la dua numero de la jaro. Do ni ne malesperu!*

*Malgraŭ tio, vi malkovros ke JEFO estas definitive tre ambicia asocio. Dum la du pasintaj monatoj, JEFO prizorgis budojn en salonoj en Parizo kaj Liono, organizis internacian renkontiĝon, aperis (eĉ plurfoje!) sur naciaj kanaloj ĉe la televido, eldonis novan T-ĉemizon... Kaj por la estonteco, ni havas ankoraŭ pli da projektoj.*

*Do legu nun pri ĉio ĉi en tiu numero...*

Ce numéro était normalement pour mars/avril, mais nous sommes déjà en mai. Donc, malgré nos promesses de ponctualité faites au début de cette année (quelle idée de prendre des bonnes résolutions au nouvel an !), nous ne parvenons pas à atteindre un rythme de parution normal. Mais, si l'on compare avec le deuxième numéro de l'année dernière, on est plus en avance (ou plutôt un peu moins en retard) de quelques jours. Donc tout espoir n'est pas perdu !

Malgré cela, vous allez découvrir que JEFO est vraiment une association ambitieuse. Pendant les deux mois qui viennent de s'écouler, JEFO a tenu des stands dans des salons à Paris et à Lyon, a organisé une rencontre internationale, est apparue (plusieurs fois même!) sur les ondes des chaînes de télévision nationales, a réalisé un nouveau T-shirt... Et pour l'avenir, nous avons encore des tonnes de projets.

Découvrez tout ceci dans ce numéro...

*Kovrilpaĝe: kelkaj el la partoprenantoj de la Fromaĝa Semajnfino en Grenoblo.*  
Sur la couverture : quelques-uns des participants du week-end "Fromage" à Grenoble.

Tony

La venonta numero aperos ĉirkaŭ la 31a de majo (jes, vere ĉi-foje!).

Sendu viajn kontribuadojn antaŭ la 15a de majo (sur disketo PC aŭ Mac, formato Word, Rtf aŭ simpla teksto).



# > JEFO freŝe .....

(Quoi de neuf chez JEFO ?)

## > INFORMADO

### Salono "Primevère '97"

*(Le salon de l'écologie et des alternatives s'est tenu du 28 février au 2 mars derniers à Lyon. C'est le principal événement public de l'année auquel participe le Centre Espéranto de la Région Lyonnaise. JEFO y était bien représenté puisque sept jeunes se sont relayés sur le stand et que plusieurs des nouveaux élèves sont aussi passés sur le salon)*

La salono pri ekologio kaj alternativoj okazis de la 28a de februaro ĝis la 2a de marto en Liono. Ĉiujare tiu salono organizita de iu asocio kaj kreita de la Verduloj allogas eksponantojn pri temoj tiel diversaj kiel energi-ŝparado, natura nutrado, medio-protektado, ktp. Resume, kaj vizitantoj, kaj eksponantoj interesiĝas pri mondo pli justa kaj ekvilibrita. Esperanto, prezentita kiel alternativo al la hegemonio de la angla, havas tie sian lokon. Estas la ĉefa evento kiun partoprenas la Esperanto-centro de la Liona regiono (CERL). JEFO estis bone reprezentita ĉar sep junuloj deĵoris ĉe la budo kaj pluraj el la novaj lernantoj vizitis la salonon. La T-ĉemizoj speciale

faritaj de Laurent por EXPOLANGUES estis vaste rimarkitaj kaj la varbiloj aĉetitaj de CERL por la okazo rapide forpreniĝis.

Post la salono nova sesio da kursoj povis komenciĝi kun kvin studentoj. Guillaume Lanier, kiu ankaŭ prizorgas la unuagradajn kursojn en la Universitato de Lyon III provas ankaŭ informi kaj interesi ilin al niaj agadoj.

✉ Bruno

### TTT-paĝoj

*(En direct de notre serveur Web : une nouvelle revue en version électronique et des statistiques sur les cours)*

Nenio tre nova en la TTT-ejo. Aperis kompreneble la aliĝilo de FESTO '97. De februaro ni gastigas retan version de la *Lettre de l'Espéranto*, informa folio publikigita de UFE. La kursoj plu funkcias kaj danke al la klopodoj de Philippe aliĝis 4 novaj korektantoj, kiuj baldaŭ ekĝuos la varmecon de la pedagogiaj rilatoj.

Kaj pri la kursoj, jen kelkaj statistikoj.

Inter 43 lernantoj (371 lecionoj korektitaj):  
Plu aktivis : 13  
Komencis DLEK : 28  
Finis DLEK : 8 (28%)

Komencis GERDA : 17  
Finis GERDA : 2 (11%)

✉ Marc (<mjb@worldnet.fr>)

## > LOKA AGADO

### Lyon

*(Le 1<sup>er</sup> février se sont réunis 16 jeunes de la région lyonnaise pour un repas commun terminé par une fondue au chocolat)*

La 1an de februaro kunvenis 16 junuloj el la granda Liona regiono – se oni konsideras ke Grenoblo estas parto de ĝi! – por komuna manĝado finita per ĉokolada fonduo. Oni ja ne perdas niajn kutimojn!

Kompreneble por tia (ĉokoladita) okazo, Alain estis tie. Ankaŭ Konrad kaj Mari (vidita por la lasta fojo antaŭ ŝia revenvojaĝo al Japanio), kiuj ĉiuj tri venis el Grenoblo. Ankaŭ partoprenis Rozenn kaj ŝiaj lernantoj el ENS: Pierre kaj Clément. Guillaume kaj liaj lernantoj: Sandrine, Franco kaj Giovanni, Pascal, Catherine, François, Bruno.

✉ Bruno

*La novaj informiloj de Jefe estas disponeblaj por tiuj kiuj volas informi aŭ varbi. Vi povas mendi ilin je tiuj favoraj kondiĉoj :*

- 1 ĝis 10 : senpage (+4,20 FRF poŝtmarkoj)
- 160 : 150 FRF (+29 FRF poŝtmarkoj)
- 500 : 400 FRF (+44 FRF poŝtmarkoj)
- po 0,70 FRF unu ekde 500 (+ poŝtmarkoj, 1 ekzemplero = 10 g)
- po 0,50 FRF unu ekde 160 por la kluboj kiu aliĝas al Jefe (+ poŝtmarkoj)
- Junaj Jefe-membroj : senpage



## FESTO

*(Nouvauté pour FESTO : on organise un programme spécial pour les enfants. Attention, il n'y aura bientôt plus de places en chambres : réservez rapidement. On cherche activement des personnes pour s'occuper du bar et de la discothèque)*

Ni decidis organizi porinfanan programon dum FESTO. Catherine Giangrossi respondecos pri ĝi. Do, se vi havas infanojn, ne hezitu aliĝi al FESTO kaj veni kun ili. Tiam anoncu vin al ŝi kaj kompreneble se vi havas proponojn por tia programo, ili estos bonvenaj.

La bedaŭrindaj informoj estas, ke pro manko da lokoj, nun ne plu eblas aliĝi kiel memzorgantoj kaj baldaŭ ne plu eblos rezervi ĉambron. Ĉar la nombro de partoprenantoj estas limigita kaj ŝajnas, ke FESTO havas pli grandan sukceson ol oni antaŭkalkulis, estas konsilinde aliĝi plej frue kiel eble por certiĝi pri loko.


Ni havas kelkajn problemojn por organizi trinkejon kaj diskotekon. Ne temas pri manko da loko, sed pri manko da respondeculoj. Do se vi iom spertas pri tiuj fakoj, bonvolu kontakti nin plej rapide.

✉ Tony



## Le mot du président

*Le soleil est là !*



*Avec le printemps, le soleil est revenu, faisant oublier l'époque glaciaire de cet hiver (-15° à l'IS !). Pour autant, le soleil très présent n'a pas fait fondre le fromage utilisé en quantité pendant la Fromaĝa Semajnfino... Aux dernières nouvelles, pas d'indigestion non plus. Au contraire, une nouvelle fois le concept des "gastronomiaj semajnfinoj" a fait ses preuves et a, d'après les diverses réactions des participants, satisfait les uns et les autres. Rendez-vous donc pour la prochaine édition, en Bretagne et sur le thème des crêpes.*


*Bien sûr, entre-temps, FESTO aura réuni de nombreux jefanoj à St Raphaël. A ce sujet, dépêchez-vous pour profiter des tarifs les moins chers, les inscriptions arrivent régulièrement et nous atteindrons bientôt les 50 inscrits, sur 100 à 150 jeunes attendus. Et il n'y a déjà plus de possibilité pour les memzorgantoj, leur nombre étant limité par le centre de vacances.*

*Côté information, les efforts de ces derniers mois avec l'édition du nouveau dépliant, la participation (massive) à Expolangues et le renouveau du Jeunespéranto info portent leurs fruits. Des coupons réponses reviennent régulièrement au siège et de nouveaux contacts sont pris régulièrement. Un suivi s'impose et un contact téléphonique avec ces personnes intéressées est souvent nécessaire pour un complément d'information. Vous aussi pouvez parler de l'espéranto autour de vous ! Nos documents d'information sont à votre disposition, gratuitement pour les membres de Jefo.*

*Jefoment vôtres,*

*Bruno*





# > Malesperantio .....

(Revue de presse)

## >TELEVIDO

*(Bruno, notre président, est passé sur TLM, télévision locale lyonnaise)*

Bruno Flochon —prezidanto de JEFO— estis invitita de TLM (Liona televido) al la vespera ĵurnalo (por anstataŭigi invititon lastminute rezignanta) la 22an de januaro, kiu aperis trifoje je 20h30, 21h30 kaj 22h30. La kvinminuta prezento de Esperanto estis anoncita en la titoloj. Bruno alfrontis neniun aĉan demandon kaj ĝojis argumenti al trafikaj demandoj.

*(informis Bruno Flochon)*


*(À l'occasion d'Expolangues à Paris, notre stand est passé au journal télévisé de France 2)*

La 30an de januaro, okaze de la Ekspozicio Expolangues en Parizo, la vespera televid-ĵurnalo de France 2 montris la JEFO-budon kaj intervjuis Gaston Riéra. Videblis la deĵorantoj kun siaj T-Ĉemizoj samdesegnaj kiel la tutnova varbilo de JEFO. Tiu elsendo

ankaŭ vidatis tutmonde dank'al la satelita francparolanta kanalo TV5. La aferon ni ŝuldas al Gaston kiu sukcesis venigi la televidskipon al la budo, kaj sekve al Anješka. Tio kion oni surekrane vidis fakte filmatis preskaŭ dekfoje, pro tio ke filmistoj ne sukcesis kapti Gaston samlaŭte krianta kiel ekster la kamera'.

*(Philippe a participé à l'émission "Qui est qui ?" sur France 2 en tant qu'espérantophone)*


La 21an de februaro je 18h50, la ludelsendo "Qui est qui ?" (Kiu estas kiu?) ĉe publika televidkanalo France 2, invitis Filip' Bérizzi kiel *espérantophone*. La ludantoj devas inter 6 invititoj kaj 6 proponataj hobiaj aŭ profesioj, trovi kiu praktikas kion. La kandidatoj devas proponi por ĉiu hobiaj iun



el la invititoj al kiu la animanto Marie-Ange Nardi faras demandojn. Pri Esperanto, la demandoj estis "Kio estas la civitaneco de Zamenhof, kreinto de Esperanto?" (respondo: rusa, ja!) kaj "Kiu famulo kutimas diskursi en pli ol 50 lingvoj kies antaŭlasta ĉiam estas Esperanto?" (respondo: la Papo). Ankaŭ okazis t.n. defio. Pri Esperanto tiu defio konsistis en traduko de diskurseto al Esperanto, por kiu la malfeliĉa fuŝelektita virino penis inventi tradukon. La kandidatoj ne malkovris kiu estis la vera esperantisto kaj kredis Filipon heraldikisto (fakulo pri flagoj), kvankam li erare (sed sufiĉe konvinkige) prezentis kiel Burgonja la flagon de Normandio.

Esperanto estis prezentita sufiĉe pozitive, eĉ se Marie-Ange diris: "tiu lingvo, kiu ne havis la atenditan sukceson". Finfine, kiam malkovrite, oni petis Filipon diri en Esperanto la frazon "karaj geamikoj de la publiko, bonan vesperon!". Li profitis la okazon por aldoni "mi salutas ĉiujn vi kaj esperas ke vi lernos Esperanton!".

La privata kompanio Elipse, kiu vendas tiun programon al France 2, jam invitis reprezentanton de JEFO por samtempa elsendo dum majo 96, kun Hélène Barkoviĉ kiel invitito kaj Guillaume Lanier kiel helpanto.



Laŭ Elipse, tiu elsendo estas vidata de tri milionoj da spektantoj.

## > MUZIKO

*(Un nouveau disque en espéranto—fait par des non-espérantophones celui-ci—vient de sortir en Espagne)*

Ekde la 17an de novembro, sonas en tuta Hispanio disko en Esperanto. La verko mem nomiĝas *Esperanto*, kaj estas eldonita de **Warner Music Spain** (disko 0630-17124-2). La disko konsistas el 10 kantoj tute en Esperanto, kantataj de profesiaj korusoj bulgaraj kaj rusaj.

La muziko estas tute sintetizila, moderna adapto kaj reverko de klasikaj pecoj ne tre konataj de la ĝenerala publiko. La nura tre konata melodio estas tiu de *Odo al Ĝojo* de Bethoven (kanto "la rido").

La diskokajero enhavas la Esperanto-tekstojn kaj tradukojn en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj japana.

La kantotitoloj estas: Astro Jupiter', Mistero numero kvin, Maro Sadko, Tirano, Thais, Zamenhof, Lumo, Universala naturo, Cigno, La rido, Esperanto.

Hispana komponisto-produktisto Elbosco (pseŭdonomo de homo, kiu antaŭe vendis plurlande en 1995 la diskon Angelis je 250 mil ekzempleroj, kaj havas ĉiutage noktan programon en tutlanda radio) venis februare 1996 al Hispana E-Federacio por peti helpon por nova projekto kiun li elpensis: disko en Esperanto kaj en la angla, kantota de diverslandaj korusoj, kun muziko adaptita el klasikaj komponaĵoj.

Simpatianto de Esperanto sed neparolanto, li volis mem verki la tekstojn, elĉerpante el diversaj fontoj. Li rifuzis proponon ke la tekstojn kunfaru esperantistoj, sed volis helpon nur pri tekstokorektado kaj prononcado, por certigi ke la

rezulto estas senmanka. Por tiu laboro li ofertis pagi sumon al la asocio. Li longtempe laboris sole, kaj fine de julio li telefonis ke li urĝe bezonas tujan helpon. Ĉiuj kantoj estis jam finitaj. Li eĉ konvinkis la kompanion Warner, ke la disko estu nur en Esperanto, sen angla. Malgraŭ ankoraŭ eraretoj, la tekstoj estis ĝenerale sufiĉe bonaj. Li verkis ilin kopie-refonde el diversa materialo pri kiu li ne volis rakonti; nur la Ĉarton pri Homaj Rajtoj kaj la Koranon li menciis. La registradoj en Sofio kaj Moskvo estis plene sukcesaj. Ambaŭkaze, la skipo revenis madriden tre kontenta pro la rezulto kaj favore impresita de la kompetenta helpo de la lokaj esperantistoj.

Sekve, oni tute ne plu aŭdis pri li, kaj subite, aperis en radio la atendata disko, tre favore prikomentita de parolisto dum minutoj. Samtempe, eblis aĉeti la diskon en muzikvendejoj, kaj venis reklamo en televido!

Unue, Warner antaŭvidis eldoni ĝin tutmonde ekde februaro, sed eble pro nesufiĉa vendosukceso, la afero ne okazis.

Reklamo en hispana televido daŭris ĝis komence de marto, kaj radioj elsendis dum marto duan kanton Tirano.

La disko daŭre aĉetebblas ĉe Eurokka kaj pliaj informoj aperos verŝajne en la ĉijara numero de Rok-Gazet'.

*(informas Marcos Cruz, Hispana Esperanto Asocio, mcm@arrakis.es, disko videblas le la TTT de HEA aŭ ekde la mia: [www.pratique.fr/~pberizzi/disko.html](http://www.pratique.fr/~pberizzi/disko.html))*

## > POLITIKO

*(Le projet d'étude de l'Association Radicale d'Espéranto sur les coûts de la communication en Europe n'a pas été retenu, par manque de sérieux de celle-ci)*

Dum 1996, la **Esperanto Radikala Asocio** proponis

studprojekton *pri Kostoj de (ne)komunikado en Eŭropo* al la Eŭropa Komisiono, kiu aprobis ĝin. La projekto, sub la aŭspicio de la 94jara nobelpremiito pri ekonomiko Reinhard Selten, celis informi pri Esperanto la plej vastan nombron iam ajn atingitan da politikistoj, entreprenistoj, instruistoj: cent mil personoj. La Komisiono proponis financi la projekton 55 procente, tiel postulante ke oni trovu la restantajn 60 mil dolarojn antaŭ la fino de la jaro. Konsekvence, ERA lanĉis alvokon al la E-movado por kolekti rapide tiun sumon.

Bedaŭrinde, sed iel kompreneble, tiu projekto ne ricevis la atenditan apogon. Klarigo jenas per oficiala komuniko, kiun faris Universala Esperanto Asocio en septembro:

*Lastatempe "Esperanto" Radikala Asocio (ERA), per diversaj komunikoj, petas financan subtenon de esperantistoj por projekto titolita "Kostoj de (ne)komunikado en Eŭropo".*

*Ĉe la 81a UK en Prago, ERA petis aŭspicion de UEA por tiu projekto. Post diskuto, la estraro de UEA malakceptis tiun peton, pro jenaj konsideroj:*

- ni dubas, ĉu ERA donas taŭgan kadron por produkti internacie aprobindan raporton;
- ni kun bedaŭro devas konstati, ke la antaŭaj agadoj de ERA, okazante sen adekvata konsultiĝo kun UEA kaj niaj kunlaborantaj instancoj kaj ofte haste preparitaj, ne malofte efikis negative en la koncernaj medioj;
- multaj esperantistoj en Italio kaj alilande raportis malbonajn spertojn en siaj provoj kunlabori kun ERA tra la lastaj jaroj.

• Per tio UEA ne volas nei la agemon kaj certagradan sukceson de ERA, kiam temas pri subvencipetoj kaj similaj agadoj ĉe politikaj kaj edukaj instancoj.

Tamen ni substrekas, ke por longdaŭra agado sur firma bazo necesas pli da vera konsultado kaj kunlaboro kun aliaj organizaĵoj de la Esperanto-movado, kaj pli da publikeco pri la financaj kaj aliaj rezultoj de la projektoj.

Osmo Buller  
Ĝenerala Direktoro de UEA

Pluraj aliaj landaj asocioj (inkluzive Unuiĝo Franca por Esperanto kaj Itala Esperanto Asocio) ankaŭ malsubtenis la projekton samtial. La takso pri nesufiĉa komunikado de ERA iel pruvatis en tio ke neniu postinformo far ERA venis pri tiu afero.

## >GAZETARO

*(Plusieurs allusions à l'espéranto dans les revues Silence et Le Nouvel Observateur)*

La ekologista revuo **Silence** ofte aperigis artikolojn pri Esperanto, inter kiuj unu lastjare alportis plurajn informpezojn al JEFO. En la septembra numero, estis nenio pri Esperanto, tamen paĝe 5 aperis foto pri bicikloj surstrate lupreneblaj en Kopenhago kie videblas du afiŝoj kun la vorto *Esperanto*: plia konfirmo ke la KEF-organizintoj gluis afiŝojn pri sia aranĝo tra la tuta ĉefurbo.

*(informis Laurent)*

En la numero 1658 de la semajna revuo **Le Nouvel Observateur**, paĝe 34, titolo "*la flamme olympique de Pierre Maurois*" pri lia vizito dum Atlanta: "*Il ne parle pas un traître mot d'anglais, mais, lorsqu'il s'agit de son Nord, P.M. connaît l'espéranto de la passion. Avec lui, le ch'timi deviendrait langue officielle!*" ("Li ne parolas eĉ vorteton en la angla, sed kiam temas pri sia Nordo, Pierre Maurois — Urbestro de Lille — konas Esperanton de la pasio. Kun li, Ŝtimi" (nordfranca dialekto) fariĝus oficiala lingvo!").

## >LIBROJ

En la libro **666, l'antéchrist** de Marc Dem (Editions du Verseau) estas aludo al Zamenhof kaj Esperanto. La libro en si mem ne estas aparte interesa, kaj aspektas kiel litolibro de kelka fanatika sekto kiu atendas mondfinon kaj satanan regnon.

*(informis CNX\*CELTILL)*

## >REKLAMO

*(La firme Nike mentionne l'espéranto dans une de ses pubs)*

La ŝukompanio **Nike** reklamis por iu sia sportŝuo per tekstego enhavante tiun frazon: "*Si ce n'est pas parfaitement clair, on peut venir chez vous et le bomber à la peinture sur les murs, en anglais, en français ou en espéranto*" ("Se tio ne estas perfekte klara, (o)ni povas veni ĉe vi por bombfarbi viajn murojn en la angla, en la franca aŭ en Esperanto"). Tiu reklamo legeblis interalie en **Science et Vie** de novembro 1996, paĝe 21.

*(informis Laurent)*

## >DIVERSE

*(Une allée du nom du créateur de l'espéranto inaugurée à Toulouse)*

Allée Zamenhof estis inaŭgurita dum marto en **Tuluzo**.

*(Mentionnez l'espéranto dans votre curriculum vitae. Votre employeur ne peut qu'apprécier votre ouverture au monde, votre dynamisme et votre esprit d'équipe. Répondez à bon escient et raisonnablement aux questions relatives à l'espéranto dans votre vie)*

Ĝentila indiferentemo sekvis mian proponon kontakti lingvocentrojn, kiuj anonas

"ĉiujn lingvojn", por peti de ili trejnadon pri bahasa, svahila aŭ esperanta. Tamen mi pluproponas alian ideon pli facile realigeblan.

## Menciu Esperanton en via vivresumo.

Ĉiuj, kiuj serĉas laborpostenon, redaktas vivresumon, en kiu ili mencias almenaŭ la anglan kiel lingvon flue legata, parolata kaj skribata. Ĉar la celo de via dungonto estas certi, ke vi ne timas internaciajn kontaktojn, via praktikado de la esperanta povas nur esti ŝatata "pluso".

Vi havas amikojn, korespondantojn kaj kunlaborajn rilatojn en pluraj landoj. Vi partoprenas en renkontiĝoj aŭ eĉ organizas tiujn. Vi kunlaboras en pli-malpli ambiciaj projektoj aŭ eĉ kunordigas tiujn.

Ĉi tiuj agadoj montras vian viglecon kaj vian transliman kunlaboremon.

Vi nur taŭge kaj prudente respondu al demandoj pri esperanto en via vivo.

*(Alain)*

*(Une pétition adressée au président de la république a été traduite en espéranto. Elle est destinée à sauver un petit garçon handicapé mental oublié par l'Etat. Si vous voulez recevoir une copie, envoyez une enveloppe affranchie à l'association "S'il vous plaît... Dessine-moi une école" 8, av. du Vercors 38600 Fontaine)*

"Peticio kiu povas ĉion ŝanĝi por nia frateto". Familio, kiu havas infanon mense handikapita, kiu ne rajtas eniri lernejon, havis ideon uzi Esperanton por fari peticion. Vi povas peti ekzempleron al la adreso supre, sendante afrankitan koverton..



# Expolangues

Fin janvier, l'espéranto était à nouveau présent à EXPOLANGUES, le salon parisien des langues.

## Les nouveautés de cette année :

- Deux stands de 4,5 m<sup>2</sup> chacun, un géré par JEFO et l'autre par UFE, tous deux financés par UFE.
- A cette occasion, JEFO a édité un nouveau tract en couleurs en 20 000 exemplaires, soit 110 kg !!

## D'abord, les chiffres :

- environs 460 adresses collectées (305 sur le stand JEFO, 172 sur le stand UFE, quelques-unes en double) ;
- cette différence s'explique entre autres par le fait que quand les exposants étaient deux par jour sur le stand UFE, nous avons été en tout 26 au stand JEFO sur les 5 jours du salon (dont certains plusieurs fois) : Abed Alaya, Agneska Moreau, Alain Fagot, Antoine Rosnet, Bruno Féré, Céline de l'Ecluse, Cyrille Pinardon, David Hromada, Elizabeth Barbay, Evelyne Dachine, Filip' Bérizzi, Flavie Audibert, Gaston Riéra, Hubert Pérouty, Ian Frazer, Jana Pérouty, Jean Marin, Laurent Vignaud, Olivier Massi, René Ballaguy, Rose Sanz, Tony Guyot, Vanessa Chédé, Vincent Charlot, William (rencontré samedi, exposant dimanche !), Yannick Nault.
- Plus de 3000 exemplaires du nouveau tract ont été distribués (à 70 centimes l'exemplaire, c'est pour JEFO le poste le plus significatif parmi les dépenses).
- Nos 305 contacts se répartissent ainsi :
  - une répartition 2/3 de femmes (contre 30% seulement de notre côté du stand), 1/3 d'hommes, 5% indéfinis (nom ambigu ou étranger) ;
  - 52% moins de 30 ans, 24% plus de 30 ans, 24% indéfinis ;
  - 71% en région parisienne (89 dans le département 75, 16 dans le 77, 24 dans le 78, 11 dans le 91, 25

dans le 92, 25 dans le 93, 14 dans le 94, 13 dans le 95).

## Les retombées médiatiques :

- Notre stand est passé le jeudi au journal de 20 heures de France 2 (voir notre rubrique Malesperantio). Certains parmi nous ont été interviewés par des radios (RFI, France Info, ...).
- Quelques contacts importants : la Présidente de l'Office de la langue Française du gouvernement du Québec, un intervenant au conseil de l'Europe, une radio pour ados *Horizon FM* qui va faire une émission de présentation de l'espéranto, une chargée de mission au Ministère de la Jeunesse et des Sports qui pourrait faire un stage avec présentation de l'espéranto, une responsable de la formation au CNED du Futuroscope, un prof à la fac de Dijon qui cherche quelqu'un pour présenter l'espéranto.

## Les suites :

- Les adresses collectées ont été communiquées à différentes associations espérantistes et représentants locaux de JEFO.
- UFE a organisé des stages intensifs, le premier week-end de mars et d'avril. Une participation assez faible (moins d'une dizaine de personnes en tout), mais la relance pour un nouveau stage en automne attire traditionnellement plus de monde qu'au printemps.
- Pour le prochain salon EXPOLANGUES, un comité d'organisation composé de volontaires prendra en charge l'organisation et le suivi du stand.


*Dans notre prochain numéro, nous étudierons les suggestions qui ont été proposées pour le stand de l'année prochaine. [Ndlr: et vous pourrez aussi voir les photos du salon.]*

*Filip'*

# LA MAMMA

Charles AZNAVOUR

DULINGVA – BILINGUE



tradukis Michel SLAGMULDER

Ĉiuj venis kaj ĉeestas  
Ĉar aŭdiĝas tiu krio  
Mortiĝas, la Mamma  
Ĉiuj venis kaj ĉeestas  
Eĉ de Sud' de Italio  
'Stas eĉ Gorgio la fifilo  
Kiu plenmane donacas  
Infanoj silente ludas  
Surgrunde liton ĉirkaŭas  
Ilia ludo ne gravas  
'Stas ilia lasta donac'  
Al la Mamma

Oni kisas ŝin tutvarme  
Litigas ŝin surkusene  
Mortiĝas, la Mamma  
Gracia Sankta Maria  
Kies statu' estas sur plac'  
Certe vi ŝin enbrakumas  
Kantante ŝin Ave Maria  
Ave Maria  
Multe da am' kaj rememor'  
Ĉirkaŭ vi, vi la Mamma  
Multaj larmoj kaj ridetoj  
Transe de vi, vi la Mamma

La viroj tiel varmiĝis  
Ĉar survoje tiel sunis  
Mortiĝas, la Mamma  
Trinkatas freŝa novvino  
El tiu bona vinarbo  
Senorde surbenkiĝas  
La ĉapeloj kaj koltukoj  
Strange oni ne malĝojas  
Apud lito de l'amego  
Eĉ onklo gitaron ludas  
Per tre milda atenteco  
Pri la Mamma!!!

Virinoj rememorantaj  
Funebrajn malĝojajn kantojn,  
Mortiĝas, la Mamma!!!  
Per la okuloj fermitaj  
Kantas kazaŭ lulus idon  
Post la laborplena tago,  
Ridetontan en la dormo  
Ave Maria!!!  
Multe da am' kaj rememor'  
Ĉirkaŭ vi, vi, la Mamma  
Multaj larmoj kaj ridetoj  
Transe de vi, vi, la Mamma  
Neniam, neniam  
Forgesos ni neniam vin

*Ils sont venus, ils sont tous là  
Dès qu'ils ont entendu ce cri  
Elle va mourir, la Mamma!!!  
Ils sont venus, ils sont tous là  
Même ceux du Sud de l'Italie  
Y'a même Gorgio le fils maudit  
Avec des présents plein les bras  
Tous les enfants jouent en silence  
Autour du lit et sur le carreau  
Mais leurs jeux n'ont pas d'importance  
C'est un peu leur dernier cadeau  
A la Mamma*

*On la réchauffe de baisers  
On lui remonte ses oreillers  
Elle va mourir, la Mamma!!!  
Sainte Marie pleine de grâce,  
Dont la statue est sur la place  
Bien sûr vous lui tendez les bras  
En lui chantant Ave Maria  
Ave Maria!!!  
Y'a tant d'amour, de souvenirs  
Autour de toi, toi la Mamma  
Y'en tant de larmes et de sourires  
A travers toi, toi la Mamma*

*Et tous les hommes ont eu si chaud  
Sur les chemins de grand soleil  
Elle va mourir, la Mamma!!!  
Qu'ils boivent frais le vin nouveau  
Le bon vin de la bonne treille  
Tandis que s'entassent pêle-mêle  
Sur les bancs, foulards et chapeaux  
C'est drôle, on ne se sent pas triste  
Près du grand lit de l'affection  
Y'a même un oncle guitariste  
Qui joue en faisant attention  
A la Mamma !!!*

*Et les femmes se souvenant  
Des chansons tristes des veillées  
Elle va mourir, la Mamma!!!  
Tout doucement les yeux fermés  
Chantent comme on berce un enfant  
Après une bonne journée  
Pour qu'il sourit en s'endormant.  
Ave Maria!!!  
Y'a tant d'amour, de souvenirs  
Autour de toi, toi la Mamma  
Y'a tant de larmes et de sourires  
A travers toi, toi la Mamma  
Que jamais, que jamais  
Que jamais tu nous quitteras*



# > Kurso por komencantoj

(Cours pour débutants)

## Leçon n°2

Voici la suite du cours commencé au numéro précédent.

Si vous êtes impatients et ne pouvez pas attendre les prochaines leçons, vous pouvez trouver le cours complet sur notre serveur WEB (<http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo>) ou, si vous n'avez pas accès à Internet, vous pouvez commander la version papier en écrivant directement au siège de JEFO et en joignant cinq timbres au tarif normal afin de couvrir les frais d'envoi et de photocopies.

Si vous avez besoin d'aide pour corriger tout ou partie des exercices ou tout simplement pour trouver la réponse à des questions que vous vous posez ou éclaircir des points que vous n'avez pas compris, écrivez-nous et nous vous proposerons un correcteur.



Lors de la première leçon nous avons vu qu'en espéranto les adjectifs s'accordent en nombre avec les noms auxquels ils se rapportent. Par contre, ils ne s'accordent jamais en genre.

Seuls les noms désignant des êtres vivants sexués peuvent prendre la marque du féminin. Pour ce faire on remplace la terminaison -o du nom par la terminaison -ino.

**viro** : homme (mâle)  
**virino** : femme  
**amiko** : ami  
**amikino** : amie  
**filo** : fils  
**filino** : fille  
**la grandaj virinoj** : les grandes femmes

Il existe une autre terminaison, bien pratique, qui nous permet de reconnaître le complément d'objet direct dans une phrase. Il s'agit de l'accusatif que l'on ajoute à la fin des noms, pronoms et des adjectifs pour former le complément d'objet direct. On reconnaîtra donc le complément d'objet direct par la terminaison -n.

**Mi sukera la varman kafon :**

Je sucre le café chaud

Prononcez bien le **n** final sans nasaliser la voyelle précédente : **varman** rime avec le mot français "Anne", et **kafon** avec "tonne".

Au pluriel: **Ni sukera la varmajn kafejn.**

Notez que la terminaison du pluriel vient avant celle de l'accusatif, qui elle-même vient toujours en dernier. Prononcez **varmajn** comme "VARm-ail-ne" (e muet) et **kafajn** comme "KAF-oi-ne" (e muet).

Le fait de placer le complément d'objet direct au début de la phrase n'en change pas le sens.

Je sucre le café chaud.  
= **Mi sukera la varman kafon.**  
= **La varman kafon sukera mi.**  
= **La varman kafon mi sukera.**

Cette possibilité, qui peut être utilisée dans un style plus littéraire, sera évitée ici par souci de simplicité.

En général les compléments autres que les compléments d'objet direct, sont introduits par des prépositions et ne prennent pas la marque de l'accusatif -n. Ceci car la préposition qui les introduit nous permet de reconnaître leur fonction de complément. Nous verrons ces prépositions plus tard, ainsi que d'autres cas dans lesquels l'usage de l'accusatif peut être utile, y compris après une préposition.

Avec le verbe "être" qui n'a jamais de complément d'objet direct, on n'utilise pas l'accusatif, car le verbe "être" implique que le sujet et l'attribut sont équivalents.

Elle est belle. "est équivalent à" Elle = belle.

Le suffixe -ino vous a déjà permis d'augmenter votre vocabulaire en doublant le nombre d'êtres vivants sexués que vous êtes capable de nommer.

Le préfixe mal- fera de même en vous permettant de connaître le contraire des mot auxquels il s'accroche.

**amiko** : ami  
**malamiko** : ennemi  
**bela** : beau  
**malbela** : laid  
**nova** : nouveau  
**malnova** : ancien, vieux

Pour mettre une phrase à la **forme négative** il suffit d'ajouter le mot **ne** avant le verbe. Prononcez **e** entre le "é" et le "è".

**Mi ne sukeras la kafon**  
= Je ne sucre pas le café

Maintenant un peu de **vocabulaire** :

**ami** : aimer  
**renkonti** : rencontrer  
**birdo** : oiseau  
**fari** : faire  
**skribi** : écrire  
**butiko** : boutique  
**forgesi** : oublier  
**sukeri** : sucrer  
**insekto** : insecte  
**havi** : avoir  
**trinki** : boire  
**limonado** : limonade  
**kapti** : attraper  
**vendi** : vendre  
**papero** : papier  
**lavi** : laver  
**vidi** : voir  
**plumo** : plume  
**peti** : demander  
**akvo** : eau  
**taso** : tasse  
**porti** : porter  
**amo** : amour  
**pura** : propre

N'oubliez pas que vous connaissez aussi les féminins et les contraires des mots appris, quand ils sont possibles.

Notez que tous les verbes à l'infinitif se terminent par **-i**. Ils se conjuguent comme le verbe **esti** en changeant le **-i** final pour **-as** au présent, **-is** au passé et **-os** au futur. Ces trois temps simples nous suffiront pour le moment.

### Exercices – deuxième leçon

Traduisez en espéranto :

016. Un garçon en bonne santé boit du lait chaud.  
017. La nouvelle boutique vend des gâteaux secs.  
018. Le grand instituteur a rencontré les nouveaux amis.  
019. Les bons amis feront un beau gâteau.  
020. La petite fille a rencontré les sœurs laides.  
021. Le frère bien portant avait une petite sœur

malade.

022. Le père lavera les petites tasses.  
023. Le bel oiseau attrapa un petit insecte.  
024. La nouvelle boutique a vendu de la mauvaise limonade.  
025. De l'eau froide ne lave pas (= **ne lavas**) un petit garçon.

Remplacez la portion de phrase entre {} par le pronom personnel approprié : **li, ŝi, ĝi** ou **ili**.

Exemple :

{La knabo} vendas kukojn. → **Li** vendas kukojn.

026. {La kuko} estas bruna.  
027. {Mia amikino} estas bela.  
028. {La bela birdo} trinkas akvon.  
029. {La butiko} estas malpuraj.  
030. {La akvo} estas varma.  
031. {Mia frato} lavas la tasojn.  
032. {La viro} havas novan amikon.  
033. {Miaj fratoj} kaptis malsanan birdon.  
034. {La virino} ne sukeris mian teon.

Formez des phrases ayant un sens en utilisant les mots donnés. Attention vous pouvez être amené à conjuguer les verbes et à mettre des mots à l'accusatif.

035. amikino - la - malvarma - mia - sukero - teo.  
036. akvo - bela - birdo - la - pura - trinki.  
037. amiko - bona - limonado - vendi - via.  
038. forgesi - mi - papero - porti.  
039. bela - esti - fratino - knabino - mia.

Résumons-nous. Vous avez maintenant appris à former le féminin de tout nom d'être vivant et le contraire de tout mot (nom, adjectif, verbe, etc.) pour peu que ceux-ci aient un sens. Vous avez constaté que tous les verbes se conjuguent comme le verbe **esti** que vous connaissiez déjà et vous avez appris la structure **-a -o -as -an -on** qui vous permet d'exprimer l'action d'un sujet sur quelque chose ou quelqu'un d'autre. Pas mal, non ?

*Rendez-vous dans le prochain **JI** pour des exercices supplémentaires portant sur les leçons 1 et 2 !*



# Al Germanio,...

Familio Clopeau partoprenos en la **Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso**, kiu tre baldaŭ okazos en Stuttgart: de la 16a ĝis la 19a de tiu-ĉi monato majo. Ili foriros el St-Brieuc kaj haltos iomete en Le Mans ĉar de tie alia juna Esperantistino kunveturos kun ili. Reveno de Stuttgart al Bretonio estas planata aŭ lunde vespere aŭ marde.

Ĉar ili vojaĝas per "camping-car", restas liberaj lokoj. Se ankaŭ vi interesiĝas pri kunveturado, **plej rapide** skribu al:

Denis-Serge CLOPEAU,  
6 rue J-P Calloc'h,  
22000 ST-BRIEUC,

aŭ prefereble **telefonu TUJ** al:  
02 96 94 08 54.

## URĜE !

# LAST-MOMENTE !

## kaj Francio !

Bonvolu noti: la sidejo de UFE estos fermita de la 6-a de junio ĝis la 24-a inkluzive. Bonvolu en tiu periodo ne sendi leterojn, nek mendojn, nek faksaĵojn. La respondilo nenion registros. Tamen, kiel ĉiu-monate okazos la 2 sabataj posttagmezaj JEFO-kunvenoj (kurso,...): la 7-an kaj la 21-an de junio.

# Pollando,...

Antaŭ-nelonge al JEFO skribis Teresa Mazur (ul. Promien 49/2, 51-659 WROCLAW, **POLLANDO**). Okaze de la 46a Internacia Eŭkristia Kongreso, kiu okazos en ŝia urbo de la **25a** de ĉi-monato **majo** ĝis la **1a** de **junio**, ŝi pretas gastigi 2 personojn.

Se ŝia propono interesas vin, skribu aŭ, pli bone kaj pli **rapide**, telefonu al ŝia hejmo ( 3451067 ) aŭ laborejo (685237, 7 h 30 - 15 h 30).

Atentu: ŝia edzo nur iomete scipovas Esperanton, do bonvolu peti Teresa.

FESTO okazos en **St-Raphaël** de la 1a ĝis la 7a de aŭgusto. Ĝin mi partoprenos, eble tien irante (kaj reveno) per aŭtomobilo. Se vi interesiĝas pri **kunveturado**, anoncu vin al mi: Laurent VIGNAUD, 25 chemin de la Brosse, 49130 LES PONTS-DE-CÉ. Restas nun 3 liberaj lokoj... senpagaj. Se multaj inter vi respondos !!, ni eĉ eble devos lui aŭtobuseton ! La kosto (ir- kaj re-ire) tiam estus ĉ. 400 frankoj por ĉiu vojaĝanto. Sed por rezervi, necesas **rapide reagi... !**





# BULLETIN D'ADHESION

04/97 À 03/98

*aligilo*

TYPES DE COTISATIONS	Moins de 30 ans			Plus de 30 ans			Abonnement seul
	JEFO	TEJO + UEA	JEFO + UFE	JEFO	TEJO	UFE	
Tarif normal en FRF	170	140/320*	300	170	380	280	170
Tarif réduit (étudiants, chômeurs, appelés)	100	-	-	-	-	-	-
<u>Donne droit à :</u>							
Accès gratuit aux cours organisés par JEFO	✓		✓				
Tarif privilégié pour les rencontres organisées par JEFO	✓		✓				
Réductions sur la JEFO'butik	✓		✓				
Tarif préférentiel Pasporta Servo	✓		✓				
Droit de vote à l'assemblée générale de JEFO	✓		✓				
Revue JeunEspéranto Info (France)	✓		✓	✓			✓
Revue TEJO Tutmonde (Monde)		✓			✓		
Revue Koncize (Europe)	✓		✓	✓			
Revue Franca Esperantisto (France)			✓			✓	
Droit de vote à l'assemblée générale de UFE			✓			✓	
Jarlibro		✓					
Revue Kontakto (Monde)		✓			✓		
*Revue Esperanto (Monde) si cotisation 320 F		✓					
<b>Formule(s) choisie(s) (cochez) :</b>							
<b>Adhésion «sympathisant» :</b>	FRF (minimum 30 FRF)						
<b>Don à Jefo :</b>	FRF						
<b>Commande(s) Jefo Butik' :</b>	FRF						
<b>TOTAL :</b>	FRF						

**A remplir :**

M/Mme/Mlle (rayez les mentions inutiles)

Nom ..... nomo

Prénom ..... antaŭnomo

Adresse .....  
..... adreso

Code postal ..... postkodo

Ville ..... urbo

Pays ..... lando

Date de naissance ..... naskigdato

Téléphone ..... telefono

Télécopie ..... faks'

B.A.L. minitel ..... leterskatolo

Internet .....

Profession ..... profesio

### INFORMATIONS IMPORTANTES :

- **JEFO** = Junulara Esperantista Franca Organizo : organisation des jeunes espérantophones français ou JeunEspéranto France. JEFO est affiliée à la fois à TEJO comme «section nationale» et à UFE comme «section jeunes». L'adhésion s'entend de octobre à septembre ou de avril à mars.
- **TEJO** = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo : organisation mondiale des jeunes espérantophones, affiliée à UEA comme «section jeune».
- **UFE** = Union Française pour l'Espéranto ou Espéranto-France, affiliée à UEA comme «section nationale»
- **UEA** = Universala Esperanto Asocio : association mondiale pour l'espéranto
- **Pasporta Servo** : guide d'adresses pour être hébergé gratuitement dans le monde entier lors de voyages à l'étranger, édité par TEJO.
- **Jarlibro** : guide mondial de tous les délégués d'associations ou clubs locaux d'espérantophones, édité par UEA.
- Les associations et entreprises peuvent adhérer à JEFO et entrent dans les mêmes catégories que les plus de 30 ans.
- Conformément à la loi Informatique et Libertés du 6 janvier 1978, vous disposez d'un droit d'accès et de rectification pour toute information vous concernant.
- Si vous adhérez à JEFO en cours d'année, merci de nous indiquer les numéros de *JeunEspéranto Info* et *Koncize* que vous n'avez pas reçus. Nous vous les ferons parvenir dans la limite des stocks disponibles.
- Si vous souhaitez que vos coordonnées restent confidentielles, cochez la case suivante :

Chèque postal, bancaire ou mandat lettre à l'ordre de "Espéranto Jeunes" à joindre à ce bulletin d'adhésion à : **J.E.F.O. 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS**

# La JEFO butik'

"La Danĝera Lingvo" de Ulrich Lins.  
Historio de persekutoj kontraŭ Esperanto.  
195 FRF

Por JEFO-membroj :  
nur 150 FRF !!

(inter krampoj)  
Por JEFO-membroj

La HyperCard-stako kiu prezentas Esperanton, por Macintosh -komputeroj...

Farita de Cleve Lendon...  
Tradukita en la francan de la klubo de Clermont-Ferrand...  
Senlime kopiebla.  
Ekzistas en la angla kaj en la franca.




La eta reĝo (de Markos)	: 40	(20)	x	=
IMO (de Markos)	: 38		x	=
CERL-Logopinglo	: 20	(15)	x	=
Malnovaj JeunEspéranto Info	: 25	(20)	x	=
Disketo HYPERCARD (Fr / An)	: 50		x	=
E-Karaktraro por Macintosh	: 50		x	=
E-Karaktraro por Windows	: 50		x	=
T-ĉemizo <i>espéranto</i> (griza)	: 70	(65)	x	=
T-ĉemizo <i>espéranto</i> (blanka)	: 60	(55)	x	=
T-ĉemizo <i>Fek al neutralec'</i>	: 50		x	=
T-ĉemizo <i>Vinilkosmo</i>	: 70		x	=
Receptareto pri ĉokolado	: 25	(20)	x	=
Receptareto pri fromaĝo	: 25	(20)	x	=
Asteriks ĉe la Olimpiaj ludoj	: 60		x	=
Dokumentujo nigra/verda	: 60		x	=
Arnau-komiksoj* (2 albumoj)	: 60		x	=
Pasporta Servo 96-97	: 70	(60)	x	=
La Danĝera Lingvo	: 195	(150)	x	=
Fratoj eble ni estas	: 36		x	=
Assimil libro+kasedoj	: 400		x	=
Kompakt-disko <i>ESPERANTO</i>	: 110		x	=

Sendokostoj : + 15

\*bonvolu atesti, ke vi estas plenkreska

**SUMO :**




Nova volumo de la aventuroj de Asteriks!

**Komparu  
niajn  
prezojn...**

...kun aliaj!


La dokumentujo eldonita de JEFO :



**Griza :  
65 FRF**  
(70 FRF por ne-membroj)

**Blanka :  
55 FRF**  
(60 FRF por ne-membroj)

**Nova T-ĉemizo de Jefe  
kvarkolora !**



La célèbre méthode Assimil "Esperanto sen peno" en coffret complet, c'est le livre... et les cassettes pour apprendre en voiture, ou pendant son jogging...

**Ne forgesu kunmeti ĉekon, kaj skribi vian adreson... aliflanke de ĉi-paĝo !**

Vi dezirus ke JEFO peru kaj disvendu vian produkton ? Ni atente pritraktos ĉiujn viajn proponojn.



# Protokolo de la Ĝenerala Asembleo de JEFO

Jen la raporto pri la Ĝenerala Asembleo de JEFO, kiu okazis dum la Fromaĝa Semajnfino en Grenoble.

Ni unue traktis la rapidajn aferojn kaj poste pli longe diskutis pri la plej gravaj taskoj.

La francaj partoprenantoj de Fromaĝa Semajnfino ĉeestis, Bruno prezidis, Laurent faris la tagordon kaj Tony protokolis.

## > Video-bendo

Bruno informas pri la stato de tiu projekto (legu pri ĝi en JI 96/4). La afero ne multe progresis kaj oni ne povas esperi novaĵojn antaŭ almenaŭ majo.

## > Komuna varbilo por UFE/JEFO

Tiu projekto nun ne plu estas en la tagordo de UFE. Anstataŭe UFE uzos la novan koloran varbilon de JEFO.

## > Revuo Esperanto-Info

Laurent informas, ke li uzas tiun franclingvan revuon por respondi al petantoj de pli ampleksa broŝuro (vidu la respondkuponon sur la nova varbilo) ĉar momente tiu broŝuro ne ekzistas. Pluraj esprimas, ke ili tute ne ŝatas la enhavon de tiu revuo.

## > La nova T-ĉemizo

Ili ĵus finproduktiĝis. Bruno kunportis plurajn skatolojn da ili por transdonado al la diversaj aktivuloj. Oni decidas pri la prezoj (vidu en la JEFO-BUTIK'). La kvanto produktita estas 200.

## > Expolangues en Parizo

Tiuj, kiuj ĉeestis en Expolangues (Laurent, Alain, Tony, Vanessa) raportas pri ĝi. Oni povas konsideri, ke ĝi estis

sukcesa. Ĉefe inponis la novaj varbiloj kaj T-ĉemizoj. Legu raporton pri ĝi en tiu ĉi bulteno. Bruno klarigas, ke UFE ne certas, ĉu venontjare estos denove budo en Expolangues.

## > Salono Globe-trotters

Vanessa vizitis tiun salonon, sed pro teknikaj problemoj (aŭto-paneo de la deĵoranto!) ne estis budo pri Esperanto en ĝi.

## > Detala broŝuro

Tony faris malneton de tiu broŝuro, kiu celas prezenti nian asocion pli detale ol la varbilo. Bruno prezentis tiun projekton al UFE dum pasinta JEFO/UFE informada komisiono. UFE pretus financi tiun broŝuron. Tony indikas, ke pro tempomanko, li ne povas doni daton de ĝia finpretigo.

## > OKEJ

Pri kio estas OKEJ legu en JI 96/3. Ĉi-jare ĝi estas organizata de JEFO kaj okazos en la sidejo dum la lasta semajnfino de majo. Tony, helpe de Filip', zorgas pri la organizado.

Bedaŭrinde pluraj landoj devis rezigni pri partoprenado, tiel ke nur ĉeestos germanoj, nederlandanoj kaj svislandanoj (kaj francoj kompreneble!). Ni tamen esperas konkretigi komunajn projektojn inter niaj asocioj.

## > Trejnseminario de TEJO

TEJO organizas trejnseminaron por aktivuloj en Budapeŝto en majo (legu pri ĝi en JI 97/1) pri la temo "Kiel aŭdigi nian voĉon", temas pri rilatoj de Esperanto-asocioj kun la amaskomunikiloj. Pluraj JEFO-anoj (Alain Fagot, Pascal Lécaille, Pascal Guillemain) partoprenos ĝin.

## > Krespa Semajnfino

Ĝi okazos en venonta septembro. La loko ne estas trovita jam, sed estos verŝajne apud Rennes. Tony kaj Pascal respondecos pri la organizado.

## > Ĉokolada Semajnfino 2

Oni devis rezigni pri okazigo de tiu semajnfino ĉi-somere. Ĝi tamen okazos, sed en septembro '98. Alain kaj Pascal respondecos pri la organizado.

## > Aliaj Gastronomiaj Semajnfinoj

Estiĝas debato pri la demando: "kio estas la celo de tiuj renkontiĝoj?". La respondo estas, ke ili ĉefe celas enirigi la novulojn en la Esperantomedion, pliintensigi la kontaktojn kun la lokaj kluboj. Sed ili devas resti malgrandaj (inter 20 kaj 30 partoprenantoj) por ne konkurenci FESTON.

## > La bulteno

La redaktoro de la bulteno bedaŭras, ke estas ĉiam la samaj homoj, kiuj kontribuas al JI.

Sekvas longa diskuto pri la du artikoloj de Vanessa en la pasinta bulteno (97/1). Kelkaj poras, aliaj kontraŭas. Tony klarigas, ke li ne volas zorgi pri bulteno, kiu parolus nur pri Esperanto. Ni ne estas sekto! Kio okazas en nia socio interesas nin, des pli se tio tuŝas al "esperantistecaj" temoj kiel kontraŭrasismo, ktp.

Pluraj mencias, ke la fotoj ofte aperas aĉaj. Tio estas pro la fotokopiado. Ni provis plurajn rimedojn sen neniam atingi bonajn rezultojn. Fakte la sola vera solvo estus presi la bultenon ĉe profesia presisto (tion ni faris antaŭ kelkaj jaroj,

kiam Jaka estis la redaktoro). Sed pro tio, la nombro de abonantoj devas kreski, ĉar momente tio ne eblas finance. Do la afero simplas: se vi volas belajn fotojn en via revuo: varbu novajn membrojn. Kaj ĝuste pri tiu lasta punkto, mi memorigas al vi, ke ekzistas nova tutkolora, tutbela varbilo (vi eĉ ricevis ekzempleron kun la lasta bulteno). Do uzu ĝin!

#### > Leĝo "Debré"

Bruno proponas fari peticion je la nomo de JEFO kontraŭ la leĝo "Debré". Sekvas longa diskuto pri Esperanto kaj faŝismo. La demando estis "kiun sintenon devas havi nia asocio pri la ekstremdekstruloj kaj iliaj ideoj?". Verŝajne tiu temo estos pludiskutata estontece.

#### > Datumbazo

Ni startis grandan operacion antaŭ nelonge: temas pri la "purigado" de la datumbazo de nomoj kaj adresoj de ĉiuj uloj, kiuj iam rilatis kun JEFO. Laurent sendis al la JEFO-aktivuloj la kontaktojn de iliaj

regionoj. Ĝis nun nur Alain por la Rodanapa regiono sukcesis fari sian parton de la laboro. Li atingis interesajn rezultojn.

#### > Financoj

JEFO finance bone fartas. Estas nuntempe 13000<sup>FRF</sup> en la kaso; antaŭvidiĝas elspezoj de 9000<sup>FRF</sup> por ĵi ĝis la fino de la jaro, do restas 4000<sup>FRF</sup> por financi niajn diversajn projektojn. La vendoj de la JEFO-BUTIK' iom malkreskiĝas.

#### > UK '98

Bruno prezentas la nunan staton de la junularo programo por la UK '98 en Montpellier. La buĝeto por la junulara programo estas nur 10000<sup>FRF</sup> entute. La sola solvo estas enirigi la junularan programon en la ĝeneralan programon de UK, kiu okazos en la kongrescentro "Le Corum" en la centro mem de la urbo kaj en la eksa kinejo "Le Rabelais". Krome estos loko por la junuloj, sed ni ankoraŭ ne scias kie. Ne estos ebleco por starigi trinkejon en "Le Corum" pro

monopolo de la tiea oficiala trinkejo, sed eble en "Le Rabelais".


Floréal Martorell, la ĉef-respondeculo de EUROKKA, okupiĝos pri la arta programo. Lia buĝeto estas 40000<sup>FRF</sup> por organizi du vesperojn.

Bruno respondecas pri la rilatoj kun la amaskomunikiloj. Li petis helpon de kvar studentoj de ESC Montpellier (ESC estas komercistaj altlernejoj en Francio) en la framo de ilia studenta laboro.

Estas projekto de broŝuro por helpi al la komunikado inter la esperantistoj kaj la tieaj komercistoj.

Ĝis nun loko por la nokto (diskoteko) ne estas trovita kaj ankaŭ mankas la amasloĝejo.

Ĝenerale tre grave mankas la junaj laborfortoj por kunlabori al tiu projekto, tiel ke ni devos plej verŝajne rezigni pri organizado de FESTO tiujare. Ni elturniĝis, indikante ke ni donos al la junulara programo de UK la nomon "FESTO".





#### > IASI

Pascal prezentas sian projekton pri Inter-Asocia Seminario pri Informado (IASI). La ĉefa celo de tiu ĉi projekto estas, ke plej diversaj asocioj kunlaboru kaj ĉesu ignori la laboron de la aliaj. La diversaj atingoj de tiu iasi povas esti: eldonado de komunaj varbiloj, komunaj informadaj servoj, komuna agentejo por rilatoj kun la amaskomunikiloj, kunordigado de la instruejoj kaj staĝejoj koncerne la diskonigadon de ilia programo, ktp. Oni proponas organizadon de IASI en Liono en oktobro aŭ novembro '97 dum tuta semajnfino.

#### > JEFO-BUTIK'

Bruno montras diversajn ekzemplojn de eblaj vendaĵoj por la JEFO-BUTIK' (interalie tiun belan kaskedon, kiun vi povas admiris (la foto paĝon 19!)).

#### > FESTO

Ĝis nun alvenis ĉirkaŭ 20 aliĝiloj [Ndlr: kompreneble, intertempe pluraj aliaj alvenis, tiel ke nun ne plu eblas aliĝi en la kategorio 'memzorgantoj' kaj preskaŭ ne restas lokoj en

ĉambroj]. Christian Rivière proponis organizi kurson por progresantoj.

Bruno priskribas la festo-ejon kaj Pascal indikas, ke iu Esperanto-staĝo jam okazis tie kaj la konkludo estis, ke la manĝaĵo estas bongusta.

Pascal ankaŭ substrekas, ke estas kelkaj problemoj pri A-kaj B-landanoj. Oni devus fiksi kiel regulon, ke nur tiuj kiuj loĝas en B-lando rajtas profiti la kotizon por B-landanoj, kaj ne tiuj kiuj havas la naciecon. Okazis ke B-landevenaj homoj loĝantaj en Francio pagis la B-landan kotizon [Ndlr: estas des pli bedaŭrinde, ke nun ne plu eblas aliĝi en tiu ĉi kategorio pro manko da lokoj, eĉ por veraj B-landanoj].

Pri la financoj, ni dediĉas 12000<sup>FRF</sup> al la programo. La organizanta teamo (Bruno, Tony, Alain, Pascal, Didier, Vanessa, Catherine, Pascal, Bernard kaj Laurent) ricevas rabaton: ili ne pagas por la programo, sed nur por la restadkosto (la prezoj por ili estas do: 1146<sup>FRF</sup> en ĉambro aŭ 672<sup>FRF</sup> sub tendo). Oni petas al ili jam pagi la tuton kaj ne nur antaŭpagon ĉar oni bezonas monon en la kaso.

#### > KOTOPo

Guillaume prezentas la novaĵojn pri kotopo. Se vi ne scias, kio estas kotopo: legu pri ĝi en ĵi 97/1. kotopo estas interkultura trinkejo (en la franca: *café interculturel avec bar associatif*). Oni intencas organizi tie temajn vesperojn kun prezentoj de lingvoj. La asocio "Mille et une langues" (Mil kaj unu lingvoj) kreiĝis por prizorgi tiun trinkejon.

La estraro de la asocio konsistas el: Sandrine Beaune (prezidantino), Bruno Flochon (kasisto), Catherine Giangrossi (sekretariino), Alain Fagot (help-sekretario). Krome, Guillaume Lanier, Yono Lanier, Pascal Lécaille kaj Christophe Labouré estas komitatanoj.

Iu staĝanto el Esc Lyon helpas en la periodo de preparado. Pluraj eblaj lokoj estas prezentitaj. Pri la financoj, estas nun 15000<sup>FRF</sup> en la kaso, preskaŭ ĉio venas el JEFO. La malfermiĝo estas antaŭvidata por venonta oktobro.

## > Elekto de la nova komitato kaj estraro

La elektoj okazas en du paŝoj: unue la membroj de jefo elektas la membrojn de la komitato (franclingve: *les membres du Conseil d'Administration*), kaj poste, la ĵus elektitaj komitatanoj elektas inter si la membrojn de la estraro (franclingve: *les membres du Bureau*). Tiel funkcias la plejmulto de la asocioj regataj de la leĝo de 1901. Krome nia regularo indikas, ke normale la balotado estas nesekreta (per levitaj manoj) krom se iu ajn el la voĉdonantoj petas, ke oni voĉdonu per sekreta balotado. Guillaume petas tion, klarigante ke, kvankam en la nuna kazo tio povus ŝajni iomete peza, estas tiel pli demokratia proceduro.

Sin prezentis por esti komitatanoj: Alain\*, Bernard\*, Bruno\*, Catherine, David, Didier\*, Flavie, Guillaume, Laurent\*, Olivier\*, Pascal\*, Philippe\*, Tony\*, Vanessa kaj Yves\*. La steleto indikas, ke temas pri rekandidatiĝo.

Voĉdonas 15 personoj.

Por Bernard, voĉdonas por: 13, kontraŭ: 2. Por ĉiuj aliaj, voĉdonas por: 15. Sekve ĉiuj estas elektitaj.

Sin prezentis por esti estraranoj: Bruno\* (prezidanto), Tony (vic-prezidanto), Olivier\* (kasisto), Pascal (help-kasisto), Laurent\* (sekretario) kaj Vanessa (help-sekretariino). Denove steleto indikas, ke temas pri rekandidatiĝo por la sama posteno.

Voĉdonas 11 personoj, inkluzive de Yves, kiu donis sian povon al Laurent kaj Olivier, kiu donis sian povon al Bruno.

Por Laurent, voĉdonas por: 9, kontraŭ: 2. Por Olivier, voĉdonas por: 9, kontraŭ: 2 (unu el la voĉdonanto kontraŭ proponas Pascal anstataŭ). Por ĉiuj aliaj, ĉiuj voĉdonas por. Sekve ĉiuj estas elektitaj.

La kontaktablecoj de la nova komitato aperas en la antaŭlasta paĝo de tiu ĉi bulteno en la rubriko "Adresaro" kaj la sekva paĝo montras fotojn de la nova estraro.

*Tony*

*On a profité du week-end "Fromage" à Grenoble pour organiser notre Assemblée Générale annuelle, au cours de laquelle on a pu débattre de très nombreux thèmes.*

*On a beaucoup parlé des futurs rencontres organisées par JEFO: les rencontres gastronomiques (la prochaine est en Bretagne sur le thème des crêpes, mais d'autres suivront), la rencontre FESTO cet été à Saint-Raphaël où l'on attend entre 100 et 150 jeunes, et aussi le programme jeune du congrès universel de 1998 qui aura lieu à Montpellier. Donc vraiment pas le temps de se tourner les pouces !*

*Egalement à l'ordre du jour : la présentation du nouveau T-shirt (voir en dernière page) qui a été beaucoup remarqué sur les salons Expolangues à Paris et Primevère à Lyon.*

*Finalement nous avons procédé à l'élection d'un nouveau Conseil d'Administration et d'un nouveau Bureau.*



! O I S S E F I B I T U J U G I B I A I G I U V


# Jen la nova estraro de JEFO:

Bruno, prezidanto



Pascal, help-kasisto


Laurent, sekretario



Tony, vic-prezidanto



Vanessa, help-sekretariino



Olivier, kasisto

# Fromaĝa Semajnfino

Post la sukceso de la Ĉokolada Semajnfino pasintjare, JEFO decidis pluorganizi tiajn semajnfinojn, nomitaj Gastronomiaj Semajnfinoj. La lasta estis la Fromaĝa Semajnfino: ĝi okazis en Grenoblo la 4an, 5an kaj 6an de aprilo. Ĝi estis granda sukceso: 27 partoprenantoj, pli ol atendite! Homoj venis el Grenoble (kompreneble!), sed ankaŭ el Chambéry, Valence, Lyon, Dijon kaj Rennes. Tamen la etoso estis internacia pro la ĉeesto de unu germano (kiu tamen ne venis el Germanio sed nuntempe studas en Grenoblo), unu bulgarino (denove ne kredu, ke ŝi venis el tiom fora lando nur por nia renkontiĝo: ŝi fakte nun faras turneon en tuta Francio) kaj kvar italoj (kaj ili ja venis el Italio speciale por ni!). La surlokan organizadon prizorgis Alain Fagot kaj Konrad Hinsén, ilin helpis Pascal Lécaille por la administrado, Bruno Flochon por la rilatoj kun la amaskomunikiloj kaj Pierre Quiros por la translokigo de la bakujoj (ne estas ŝerco!).

Dum tri tagoj, ni kuiris kaj manĝis pladojn faritajn el fromaĝo. Niaj tri ĉefkuiristoj: Sandrine Beaune, Didje' Loison kaj Rozenn Texier unu post la alia majstris la skipon de la amatorkuiristoj. La multnombra partoprenantaro iel ĝeniĝis pro la malgrandeco de la kuirejo, sed ĉio disvolviĝis en tre gaja etoso.

Ni kompreneble profitis la okazon por viziti Grenoblon. Ni grimpis monteton por ĝui la pejzaĝon, sed ni tion faris estante filmitaj de nacia televido M6 por la regiona parto de ilia televid-jurnalo. Poste, por ripozi niajn lacajn piedojn, ni iris al la urbodomo, kie ni estis invititaj partopreni al honora vino (ĉar montgrimpi soifigas!).



Alain kaj Konrad, la lokaj organizantoj

Konklude, ni ĉiuj travivis agrablan semajnfinojn, eĉ se la programo suferis kelkajn problemojn: la du planitaj koncertoj (de Massimo Manca kaj de Jomo) ne povis okazi.

Ĉiuj kompreneble pretas rekomenci. Do ĝis venonta Gastronomia Semajnfino!

*Tony*



La partoprenantoj



Konrad filmita de M6



Komuna preparado de pladoj

## Mondskala enigmoserĉado

La ago-tago estas tago por agi, paroligi kaj linformi pri Esperanto. Per Esperanto ni povas kunlabori por internacia agado tamen plej ofte malfacilas trovi volontulojn ĉar oni ne rekte ricevas lokan efikon pro internacia agado. Kontraŭe ĵurnalistoj konsideras pli grava internacian eventon ol loka eventeto. Per tiu ĉi teksto mi provas instigi internacian eventegon kiel sumon de lokaj eventetoj. Kunlaborante por estigi ĝin, oni certigas al loka eventeto internacian videblecon kaj al internacia evento lokajn konsekvencojn.

Franca junulo naskis la ideon okazigi mondkalan enigmoserĉadon. Dum enigmoserĉado ĉiuj teamoj de konkurs antoj devas respondi al demandoj kaj partopreni ludojn (mensajn kaj fizikajn) por gajni poentojn kaj trovi la ĝustan vojon de iu loko al la sekva de la planita rondiro. Tamen kiel tia enigmoserĉado povas esti evento samtempe mondkala kaj loka? Ĝi estu mondkala pro samaj dato kaj demandaro kaj loka pro uzata(j) lingvo(j) kaj dimensio kaj specifecoj de irvojoj. Kompreneble lokaj gazetaro kaj radioj raportos pri tia loka evento des pli ke ĝi havos internacian gravecon. Oni povas esperi, ke ankaŭ regionaj kaj naciaj ĵurnaloj, radioj kaj televidkanaloj raportos pri la plej grandaj aŭ eĉ pri la nombro kaj diverseco de la itineroj, ĉiam lige kun la internacieco de la evento kiel tuto.

En enigmoserĉado la demandoj ebligas aŭ gajni poentojn aŭ trovi la ĝustan vojon. Kiel la demandaro povus esti la sama por ĉiuj lokoj? Fakte nur parto de la demandaro estas internacia. Tri tavoloj kunekzistas: internacia, nacia kaj loka. Internacia komisiono elektas la demandojn de malfacilaj (eĉ por esperantistoj) ĝis facilegaj (eĉ por neesperanto-parolantoj) laŭ kategorioj: lingvo, historio, eminentuloj, movado kaj eventuale politiko. Nacia komisiono elektas demandojn pri la naciaj movado kaj eminentuloj. Tiu komisiono ankaŭ tradukas la internaciajn demandojn al la nacia(j) lingvo(j). Kaj fine loka komisiono elektas la itineron kaj rilatajn demandojn kaj ludojn. Nepras profiti de ĉiuj viziteblaj zoej almenaŭ por citi ilin al la loka gazetaro. Por pli internaciigi la eventon ankaŭ eblus prepari la demandaron por poste publikigi internacian klasadon de la partoprenintaj teamoj.

Por ĉiuj demandoj pri tiu ideo bonvolu kontakti :


BERIZZI Philippe  
FAGOT Alain  
(adreso sur la lasta paĝo)

# Kiel Ĉarmi Viron?

Se vi bone memoras, en la bulteno 95/3 aperis artikolo titolita "Kiel per dek lertaĵoj ĉarmi virinon por la tuta vivo?". Fine de tiu artikolo, ni promesis sekvon "Kiel ĉarmi viron?". Jen ĝi!

## Kiel per dek lertaĵoj ĉarmi viron?

- 1 - Vi ne bezonas serĉi lin, li jam nun dezirplene vin kaŝrigardas!
- 2 - Ŝminku vin nur iomete, aŭ eĉ tute ne.
- 3 - Montru intereson al li, donu al li la senton, ke li ne estas, kiel la aliaj (notu: tio ja ofte estas la kazo, sed ne ĉiam laŭde al li).
- 4 - Ne akcentu vian intelektan superecon, lasu lin kredi, ke li povas instrui ion al vi.
- 5 - Neniam parolu pri la temo, kiu igos lin fuĝi: pri la infano, kiun vi tiom deziras.
- 6 - Ne diru al li, ke vi estas jaluz-karaktera, precipe se vi estas tia, sed diru al li, ke vi ŝatas reciprokan fidon.
- 7 - Estu orfino kun nek frato nek fratino, aŭ diru al li, ke vi neniam rilatas kun ili.
- 8 - Ĉiam bone zorgu pri viaj subvestoj: multfoje, multe pli ol oni pensas, la viroj vin fuĝas, pro viaj subvestoj.
- 9 - Neniam estu tro "unua paŝo", por ne montri al li, ke vin tre allogas malĉasteco, kvankam tio ja plaĉos al li!!
- 10 - Finfine, kiam vi renkontas lin por la unua fojo: ĉarme ridetu, tio ja restas la plej efika solvo.



\* [Ndlr: Oni ne volas riski saman skandalon kiel pasintece (rememoru JI 92/4!)]



JUNULARA  
ESPERANTISTA  
FRANCA  
ORGANIZO

JeunEspéranto-France  
4 bis, rue de la Cerisaie  
75004 PARIS

36 15 ESPERANTO  
36 14 CNX\*#JEFO  
www.worldnet.fr/~mjb/jefo

direktoro de la eldono/  
directeur de la publication :  
Bruno Flochon

redaktoro / rédacteur :  
Tony Guyot

deseĝnoj / dessins :  
Tony Martin (rubrik-titoloj)  
<www.patriot.net/users/tony>  
Vanessa Chédé (p. 22)

redaktora teamo /  
équipe de rédaction :  
Philippe Bérizzi,  
Vanessa Chédé,  
Alain Fagot,  
Bruno Flochon,  
Laurent Vignaud

kontribuis al tiu numero /  
ont participé à ce numéro :  
Marc Bavant,  
Christophe "Jaka" Féré,  
Michel Slagmulder


Presita fine de aprilo je 300  
ekzempleroj. Por aliĝi al  
JEFO kaj ricevi regule tiun  
bultenon, plenigu kaj sendu la  
aliĝilon en la centraj paĝoj.  
La artikoloj en JEFO informas  
reliefigas la vidpunkton de  
ties aŭtoroj, ne nepre tiun de  
JEFO. Tamen JEFO  
permesas al si la rajton  
publiki aŭ ne tiujn artikolojn.  
Represaĵoj estas permesataj,  
kondiĉe ke oni indiku la  
nomon de la aŭtoro kaj la  
fonton kaj ke JEFO estu  
informita.

Imprimé fin avril à 300  
exemplaires. Pour adhérer à  
JEFO et recevoir  
régulièrement ce bulletin,  
remplissez et renvoyez le  
bulletin d'adhésion situé en  
pages centrales.

Les articles parus dans  
JeunEspéranto info  
n'engagent que leurs  
auteurs. Toutefois, JEFO se  
réserve le droit de les publier  
ou non.

Tous droits de reproduction  
autorisés sous réserve  
d'indication de l'auteur et de  
la source et sur simple  
information à JEFO.

ISSN : 265 3853



# > Adresaro .....

(Carnet d'adresses)

## Komitatanoj de JEFO / Membres du Conseil d'Administration de JEFO :

prezidanto / président  
Bruno Flochon  
6 C, av. de l'Hippodrome  
69890 La Tour de Salvagny  
☎ 04 78 48 00 40 [R]  
☐ CITRON

vicprezidanto / vice-président  
Tony Guyot  
8, rue Jules Guesde  
35000 Rennes  
☎ 02 99 31 32 78 [R]  
☐ 02 99 35 09 44  
☐ ROAZHON  
<tony.guyot@criil-ing.fr>

Flavie Audibert  
1, rue Henri Say  
92600 Asnières  
☎ 01 47 93 15 04

Bernard Bouron  
Rés. les Argonautes – bât. A  
521, av. Jack Kilby  
06270 Villeneuve-Loubet  
☎ 04 93 73 92 91  
☐ ZIKO

David Hromada  
14, rue Louis Bouchet  
93220 Gagny  
☎ 01 43 32 86 78  
<veszko@aol.fr>  
<veszko@magic.fr>

kasisto / trésorier  
Olivier Moreau  
48, rue Raffet  
75016 Paris  
☎ 01 42 88 51 58 [R]  
☐ TAK  
<moreauo@thmulti.thomson.fr>

help-kasisto / trésorier adjoint  
Pascal Lécaille  
BP 3019  
69394 Lyon Cedex 03  
☎+☐ 04 72 36 07 14 [R]  
☐ PASCALL

Yves Bachimont  
Rés. des Elfes – appt. 15  
20, chemin de Bordeblanche  
31100 Toulouse  
☎ 05 61 49 32 15  
☐ VIVAKVO  
<yves.bachimont@meteo.fr>

Alain Fagot  
26, rue Berthe de Boissieux  
38000 Grenoble  
☎ 04 76 86 19 34 [R]  
<alain.fagot@imag.fr>  
<www.apache.imag.fr/~fagot>

Guillaume Lanier  
18, rue Imbert-Colomès  
69001 Lyon  
☐ GIJOM

sekretario / secrétaire  
Laurent Vignaud  
25, chemin de la Brosse  
49130 Les Ponts-de-Cé  
☎ 02 41 30 08 70 / 02 41 69 70 12  
☐ JEFO49

help-sekretario /  
secrétaire adjointe  
Vanessa Chédé  
22, rue de Fontenay  
92140 Clamart  
☎ 01 46 42 53 51 [R]  
☐ MONTY

Philippe Bérizzi  
17, allée Jean-Baptiste Clément  
78570 Andrésy  
☎ 01 39 70 78 15 [R]  
☐ JEFO78  
<pberizzi@pratique.fr>  
<www.pratique.fr/~pberizzi/>

Catherine Giangrossi  
BP 3019  
69394 Lyon Cedex 03  
☎+☐ 04 72 36 07 14 [R]

Didier Loison  
15, rue Maurice Emmanuel  
21000 Dijon  
☎ 03 80 43 44 79 [R]  
☐ DIDJE

☎ = telefono, [R] = respondilo

☐ = telekopio

☐ = minitel 36 14 CNX

## Lokaj adresoj de junularaj kluboj / Adresses locales des clubs de jeunes :

### Paris

4 bis, rue de la Cerisaie  
75004 Paris  
M° Bastille

Chaque 1<sup>er</sup> et 3<sup>ème</sup> samedi du  
mois à partir de 14h (initiation  
à 16h et cours à 17h).

### Lyon

CERL  
7, rue Major Martin  
69001 Lyon  
M° Hôtel de Ville

Le samedi de 15h à 17h (jeunes  
le 1<sup>er</sup> samedi du mois).

Maison de l'Europe  
12, rue du Pdt Carnot  
69002 Lyon  
M° Cordeliers

Le 3<sup>ème</sup> mercredi du mois de  
18h30 à 20h.

### Dijon

CUBE  
6 B, rue du Recteur Marcel  
Bouchard  
21000 Dijon



# KIE ?

*A LA JEFO Butik' !*

# KIOM ?

*Ekde 55 frankoj !*

# KIO ?

*La nova T-ĉemizo !*

# KIAM ?

*Hodiaŭ, nun, tuj !*

